

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 510

APRILIO 1948

LEGOLIBRO POR SUPERAJ KURSOJ KAJ MEMKLERIGO

De IVAN SARAFOV



232 paĝoj, broŝ. Prezo 7 ŝil., aŭfranko 6p. (30 rpk.)

“Aĝrable impresas la objektiva prezento de materialo, kiu estas samtempe instrua kaj interesa. Legante ĉi tiujn tekstojn, la studanto nekonscie asimilos multajn informojn, kiujn havigi necesus tralegi grandan kvanton da libroj. La informoj estas ĉerpitaj el multaj fontoj kaj nedetale skizas diversajn fazojn de la evoluo de la Esperanto-movado.”

“Aparte interesaj estas la notoj pri la elvolviĝo de la Laborista Esperanto-movado, kaj eksterlandanoj legos kun intereso kaj ĝuo la ĉerpaĵojn el la Bulgara literaturo.”



Eldonita de

BULGARA ESPERANTISTA KOOPERATIVO

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

HISTORIA PAĜO EL ESPERANTO, 1-a DE MAJO 1908

Konvenas hodiaŭ konigi al la legantoj de la nuna *Esperanto* parton de artikolo verkita de H. Hodler okaze de la fondo de U.E.A. La titolo de la artikolo estis *Internacia Organizaĵo Esperantista* kaj estis la tria en la serio traktanta la tutan problemon. Ni citas ekstrakte la plej tipajn partojn.—RED.

Ni nun havas la plezuron informi niajn legantojn, ke la nomita internacia organizaĵo, post diversaj klopodoj oficiale fondiĝis sub la nomo *Universala Esperanto-Asocio* (U.E.A.). Konsekvence ni nun parolos ne pri projekto efektivigota aŭ efektiviginda sed pri ekzistanta realaĵo, kies agadon la publiko baldaŭ povos juĝi laŭ faktoj.

Kiel ni jam diris la *Universala Esperanto-Asocio* celas la plifaciligon de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreon de fortika ligilo de solidareco inter samideanoj. La unuan celon ĝi atingos iom-post-iom per la starigo de la diversspecaj internaciaj servoj, kiujn ebligas tuj de nun la disvastiĝo de nia lingvo. La dua parto de la programo montras, ke nia *Asocio* estas gvidata ne nur de pure materiaj interesoj kaj komercaj celoj grupigante ĉiulokajn homojn en unu tute neŭtrala organizaĵo, plimultigante la servojn, kiujn al ĝi reciproke povas fari tiuj homoj, faciligante iliajn kreskantajn rilatojn internaciajn, donante al ili la eblecon sin ne nur reciproke komprenadi, sed ankaŭ utiladi, ĝi vole ne-vole plifortikigos kaj plirealigos ilian solidarecon kaj kreos inter ili ligilon tiom pli nerompeblan, ke ĝi havos materialan fundamenton. Unuvorte, la *Universala Esperanto-Asocio*, konforme al la celo, kiun ĝi aljuĝis al si, sekvas la tradicion de la ĝisnuna *Esperantismo* kaj penas faktigi kaj enkorpi tiun internan ideon, kiu gvidis la kreinton de *Esperanto*, kiuj malgraŭ ĉiuj ventegoj vivigis la *Esperantistaron*, forpelis ĉiujn danĝerojn de disunuigo kaj solidarigis ĉiujn *Esperantistojn* kontraŭ ĉiuj atencoj.

La *Universala Esperanto-Asocio* por la difinita celo uzos la lingvon *Esperanto* tia kia ĝi rezultas el sia verkaro, ĝi konsideras la lingvon kiel jam ekzistantan interkomunikilon, apartenantan al ĉiuj homoj, kiuj ĝin uzas kaj sekve ne perforte tuŝeblan de iu ajn aŭtoritato. Ĉiujn teoriajn lingvajn diskutojn ĝi konsideras kiel ekster sia celo. Fine, la neŭtraleco de la *Asocio* rilate al politiko, religio kaj nacieco, estas principo, pri kies neceseco ni ne bezonas insisti.

La interna organizo de la *Asocio* estas kiel eble plej simpla. En ĉiu loko, kie tio estas ebla, estas delegito, elektata nun de la grupoj aliĝintaj, poste nur de la anoj de U.E.A. La delegito reprezentas la komitaton, zorgas pri la interna administrado de la U.E.A., klopodas por starigi en sia loko la servojn internacie organizatajn de la *Asocio*.

La kondukantaro konsistas el komitato elektita de la delegitoj. Ĉiu komitatano sin okupas pri speciala fako sub sia respondebleco, elektas mem la kunlaborantojn, kiujn li juĝas utilaj. Nuntempe ekzistas nur tri fakoj: 1. **Administrado**, kiu prizorgas ĉion, kio koncernas la internan vivon de la *Asocio*, delegitoj, financoj, oficiala organo, korespondo, k.t.p. La fako 2 dediĉita al **Konsuloj** kaj **Oficejoj** sin okupas pri la starigo kaj regula funkciado de tiuj institucioj kun ĉiuj dependantaj servoj, kiel tradukado, dungado, virinoj, studentoj, komerco, k.t.p. La fako 3, difinita por **Turismo**, celas la organizon de esperantistaj vojaĝoj kaj ekskursoj, esperantistaj hoteloj kaj kolonioj k.t.p. Kompreneble laŭ la postuloj de la praktiko aliaj fakoj estos kreataj aŭ per divido de la nunaj fakoj aŭ per kreo de novaj. Sed en la komenco estas necese limigi la nombron de la traktotaj demandoj.

Kiel oni povas juĝi tiu organizaĵo estas samtempe simpla kaj fleksebla. Ĝi povas libere plivastiĝadi laŭ la bezonoj kaj cirkonstancoj per vojo normala, sen ŝanceliĝo de la primitiva fundamento.

Kun tiu programo ni turnas nin al la jam vasta popolo esperantista, al ĉiuj samideanoj, kiuj deziras eliri el la vojo de vana diskutado kaj pura predikado por eniri en la vojon de la efektiva uzado kaj valorigo de *Esperanto* kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj. Al ĉiuj kiuj volas labori ni turnas nin kun la espero, ke nia alvoko estos aŭdita.

FRANCUJO

Honore al la kongresoj de Normandiaj Esperantistoj kaj Maristaj Esperantistoj dum 1948 en Fécamp, la urba poŝtaŭtoritato surprisigos specialan varbstampaĵon sur ĉiuj poŝtaĵoj. Poŝtkontoro estos instalita dum la kongresperiodoj en la domo de la Turisma *Asocio*. Aŭfrankita kongresa poŝtkarto kun glumarko kaj la memoriga poŝtstampo estos ricevebla kontraŭ 2 rpk. per S-ro Delamare-Moré, 32 r. Alex-Legros, FECAMP, S. Inf.

ESPERANTISMAJ PROBLEMOJ

IV.—Tutesperantista reprezentado

La efektivigita unuiĝo de la du ĉefaj organizaĵoj Esperantistaj U.E.A. kaj I.E.L. denove levas la problemon pri la reprezentado de la tuta movado. Kiu laŭjure reprezentas la movadon? Oni povas respondi hodiaŭ: U.E.A. kaj ĝia komitato-estraro, ĉar ĝi estas la plej forta nombro kaj la plej influa unuopa organizaĵo. Restas tamen unu makuleto. Tio estas la flankenstaro de Esperanto-organizaĵoj kiuj grupigas konsiderindan nombron da samlingvanoj. Temas unue pri Sennacieca Asocio Tutmonda kaj due pri Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Ambaŭ defendas, kiel ni, la saman ideon, nome la adopton de Esperanto en la ĝenerala uzado. Ambaŭ ligas kun tiu ideo ankoraŭ plian ideon, unu soci-ekonomian, la alia la katolikismon. Ambaŭ opinias, ke la neŭtraleco de nia ĉefa organizaĵo estas pli malpli nekunigebla kun ilia propra celado, aŭ ke ĝi fakte nebligas pli intiman kunlaboradon.

Tial ke de diversaj flankoj oni insistas, ke nia movado devus formi tutaĵon, egale laŭ kiu recepto, ni ekzamenus funde la donitaĵojn kaj la eblojn. Unue, ni tuj diru, ke neniel estas eble loki ĉiujn *sub unu ĉapelon* laŭ la formulo *unu lingvo, unu movado, unu organizaĵo*.

Ni unue traktu pri S.A.T. La verkinto de ĉi tiu artikolo korespondis pri unueca fronto Esperantista kun la patro de S.A.T., E. Adam (Lanti) dum li vivis en la urbo Meksiko, sed kiu mortis pasintan jaron. Kamarado Lanti, larĝvida homo, principe subtenis la ideojn al li komunikitaĵoj kaj certigis sian kunhelpon. Jen la ĉefaj punktoj kiuj formu la bazon de kunagado inter U.E.A. kaj S.A.T.

1. Sendependeco de ambaŭ organizaĵoj en ĉio kio rilatas la propran agadon (Ideologia sendependeco).
2. Kreo de supera instanco kun senditoj aŭ delegitoj el ambaŭ organizaĵoj por doni al iuj gravaj klopodoj, pri kiuj ambaŭ estas same interesitaj, maksimuman apogon ĉe aŭtoritatoj kiel ankaŭ ĉe la Esperantista publiko.
3. Praktika kunagado, ekzemple per kontrakte fiksita interŝanĝo de servoj; eventuale kompleta jarlibro kaj aliaj ebloj de komun-Esperantista agado.

Tio estas la elementaj punktoj pri kiuj ni korespondis (t.e. E. Lanti kaj H.J.). Por ke ĉiu komprenu bone, ni analizos mallonge unu eron post alia.

La unua punkto klarigas sin. Nek U.E.A. nek S.A.T. (aŭ alia organizaĵo kun speciala celo) povas aŭ volas forlasi sian ideologion; la neŭtralecon de unu, la sennaciismon de la alia. Sed ambaŭ havas unu komunan celon, nome la ĝeneraligon de nia lingvo, kaj tio estas la ligilo inter ambaŭ. Se ni ne estas sam-*ide*-anoj ideologiaj, ni almenaŭ estas sam-*lingv*-anoj. Ni rekonu tion kio nin ligas, kaj apartigu tion kio nin disigas!

La dua punkto tuŝas la demandon pri la reprezentado de la tuta movado. Krei tian instancon sen leĝdona povo devus esti ebla. Ĝia rolo estu klara kaj precize formulita por ke neniu havu la penson, ke la alia intencas absorbi lin. Tia *supera komitato de la Esperanto-movado* reunuigu la reprezentantojn de U.E.A., de S.A.T. kaj de pliaj organizaĵoj kun ioma gravo.

Supera komitato—*de iure*—povus paroli en la nomo de la Esperantistaro, kaj ĝia agado de komuna intereso estus tiam morale apogata de ĉiuj.

Aranĝo pli kompleta estus tia montrita sub 3. La ĉefa elemento estus kontrakto je limigita aŭ nelimigita daŭro, kiu reguligus la interŝanĝon de servoj. Membro de S.A.T. laŭ tio rajtus uzi la servojn de la delegitoj de U.E.A., kaj reciproke U.E.A.-ano povus sin turni al S.A.T.-reprezentanto en loko kie U.E.A. ne havas delegiton. Fine, la Jarlibro de U.E.A. povus esti la *Jarlibro de la Esperanto-movado* kaj ĝi povus enhavi ĉion krom la partoj de U.E.A. kaj S.A.T. kiuj eventuale povus aperi sur alikolora papero. La kunigo de du jarlibroj en unu permesus presigi nombron pli interesan tiel ke por pagataj reklamoj pli efika argumento ekzistus.

Iuj eble opinias, ke U.E.A., neŭtrala organizaĵo, ne povas ligiĝi kun neneŭtrala aŭ politika tendenco. Se U.E.A. estas neŭtrala rilate al politiko, religio kaj sociaj demandoj, ĝi tute ne estas tia en ĉio kio tuŝas la progreson de ĝia ideo! Cetere, ne temas pri ia *kunfandiĝo* sed pri **kunagado** en precize difinitaj aferoj. Nia movado hodiaŭ troviĝas en defenda pozicio. Ĉiuj kiuj deziras la triumfon de Esperanto devus kuniĝi en fronto de rezistado kontraŭ la malamiko. Dum la milito kuniĝis ĉiuj fortoj, katolikoj, komunistoj, liberaluloj, socialistoj, burĝoj kaj klaskonsciaj laboristoj por liberigi patrolandon de malamiko, kiu minacis detrui ĉion. Ili havis komunan celon: la liberon.

Ni Esperantistoj havas komunan celon, sed mankas al ni komuna batalfronto. Montri la eblojn kiel oni povus atingi tian komunan fronton estas la celo de ĉe tiu artikolo. Povas esti, ke la poeto pravas dirante: *Facile kunordiĝas ja la pensoj, sed krude en la spaco kunpuŝiĝas la objektoj.* H.J.

P.S.—La ĉi-supra artikolo reprezentas la opinion de la redaktoro de ESPERANTO, kiu multe sin okupis pri la problemo. Ĝi ne ligas la Estraron kaj Komitaton de U.E.A., kiu deziras ekscii la eĥon de ĉi tiu klarigo de problemo, flanke de legantoj kaj membroj.

LA PETSKRIBO

Landoj

Norvegujo	.. 459691	Islando	4346
Germanujo	.. 271478	Portugalujo	3462
Nederlando	.. 47024	Aŭstralio	3370
Francujo	.. 33005	Nov-Zelando	2540
Ĉeĥoslovakujo	.. 31455	Svisujo	1946
Britujo	.. 27686	Egiptujo	1825
Bulgarujo	.. 21992	Maroko	1037
Svedujo	.. 17759	Grekujo	860
Jugoslavujo	.. 14138	Palestino	528
Aŭstrujo	.. 12499	Irlando	463
Italujo	.. 11531	Urugvajo	460
Polujo	.. 9703	Kanado	360
Danujo	.. 9106	Sud-Afriko	290
Brazilo	.. 6711	Hispanujo	.. 276
Belgujo	.. 6614	Hindujo	.. 236
Finnujo	.. 6354	Ceteraj lokoj	.. 594
Usono	.. 6268		
Argentino	.. 6248		1028015
Hungarujo	.. 6160		

Okupoj

Artistoj	.. 2000	Navigaciistoj	.. 1125
Delegitoj Komunumaj	507	Parlamentanoj	.. 232
Dentistoj	.. 549	Policistoj	.. 2318
Desegnistoj	.. 2065	Presistoj	.. 3227
Dommastrinoj	.. 43880	P.T.T.-istoj	.. 6879
Edukaj Aŭtoritatuloj	1131	Religiistoj	.. 1488
Elektristoj	.. 2931	Sciencistoj	.. 1165
Farmaciistoj	.. 1244	Sindikacifoj	.. 438
Farmistoj	.. 9854	Soldatoj	.. 3300
Hotelistoj	.. 1647	Studentoj	.. 31613
Inĝenieroj	.. 13340	Ŝoforoj	.. 2310
Instruistoj	.. 18220	Ŝtatoficistoj	.. 7571
Juristoj	.. 1642	Teksistoj	.. 1347
Ĵurnalistoj	.. 1150	Transportistoj	.. 19071
Komercistoj	.. 56515	Urboficistoj	.. 3552
Konstruistoj	.. 6226	Vendistoj	.. 8917
Kuracistoj	.. 4305	Vestistoj	.. 6011
Laboristoj	.. 21200	Diversaj	.. 716868
Lingvistoj	.. 317		
Metiistoj Diversaj	21860		1028015

Nia kampanjo eniris novan etapon. La bonega faro de la Germanaj samideanoj, havigi la kolektivan subskribon de Bayerischer Gewerkschaftes-Bund komencis serion de tiaj kontribuoj, kiuj frape montras la vojon. La Germanoj poste sendis plian kolektivon el 119,863 de la Sozialdemokratische Partei en München. Tuj post tio niaj Norvegaj kunlaborantoj duobligis la ciferojn per gratulinda kontribuo el duonmiliono el kiu la plej elstara estas la 440,000 de la Arb. fagl. Landsorganisasjon (laborista landa organizaĵo—T.U.C.). En la momento kiam ni skribas ĉi tiun komunikon ĵus alvenis raporto, ke plia miliono estas survoje el Ĉeĥoslovakujo.

Tiuj gigantciferoj ne fortimigu la ceterajn kunlaborantojn. Ni direktu niajn gratulojn al Aŭstrujo kies sendaĵo de 4600 pro la Turistenverein "Die Naturfreunde" en Graz estas tre akceptinda, kaj eĉ la modestan 120 de la Komunista Partio en Sauda, Norvegujo ni salutas. Do, eĉ niaj samideanoj kaj kunlaborantoj en limigita sfero povas ankoraŭ fari bonan laboron kaj helpi nian aferon. Necesas nur atenti ke la efektiva subskribo **devas esti de la Prezidanto aŭ Sekretario** (prefere ambaŭ) de la koncernata organizaĵo.

Antaŭen do, al la granda venko !

La Oraj Koretoj

Kun stranga anima sopiro konstanta
En iu preĝejo silente,
Vizaĝon de Kristo sur kruco pendanta
Mi longe observis atente.

Dieca vizaĝo esprimis Misteron,
Paleco de l'mort' sur ĝi regis,
Sur tiu vizaĝo mi legis suferon,
Turmenton prohoman mi legis.
Ŝtoniĝis, ombriĝis sanktul-siluetoj
Sur flava kandela lumfono,
Nur etaj el oro faritaj koretoj
Palbrilas en dorna la krono.

Nur etaj el oro koretoj faritaj,
Je flagraj lumludo-petoloj,
Lumbrilas, lumflamas korformon-imitaj
De l' Riĉo damnindaj simboloj !

Orlumas la Riĉo sur korpo de Kristo,
Per oro riĉuloj Lin vestis,
Ĉar Kristo dum sia surtera ekzisto
"Konata riĉula Di' estis !"

Kaj tiam dum tiuj solecaj pez-horoj
Mi sentis sopiron en koro,
Ke homoj al Kristo anstataŭ vivkoroj,
Alportas koretojn el oro !

Eugeniusz Matwiejczuk.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

HISPANUJO

Laŭ ĵus ricevita informo de D-ro Rafael Herrero en Valencia, la Hispana Esperanto-Federacio estas aprobita de la registaro. Tiu aprobo inkluzivas la kutiman agadon, kunveni, propagandi, instrui k.s. Ankoraŭ mankas la aprobo pri la estraro de H.E.F., afero baldaŭ okazonta. La adreso de la restariĝinta organizaĵo estas: H.E.F., Lauria 20, VALENCIA, Hispanujo.

Oni informas, ke oni ankoraŭ ne povas korespondi kun Germanujo kaj orientaj landoj kaj petas, ke oni ne skribu el tiuj landoj ĝis tia korespondado oficialiĝos.

NEDERLANDO

Grava apogo por Esperanto

Dum la *Esperanto-semajno* en Zaandam, Septembron 1947, la Urbestro S-ro D-ro J. in t' Veld havis antaŭ la okuloj praktikan demonstracion de la efiko de Esperanto, kiam libere intermiksiĝis 26 samideanoj el 10 landoj. La Urbestro mem partoprenis la kunvenojn dum la *Semajno* kaj esprimis sian tutan simpatian al nia afero.

S-ro D-ro in t' Veld ĵus elektiĝis Ministro por Rekonstruado en Nederlando kaj tial havas vastan influon. En antaŭnelonga radio-intervjuo, kiam oni lin demandis pri la impresoj dum la *Esperanto-semajno* en Zaandam, la Ministro diris:

“Mi povas diri, ke la praktika konatiĝo kun Esperanto estis por mi io tute neatendita, tiom ravita mi estis. Antaŭ nelonge mi partoprenis internacian kongreson en Parizo, kie nur la franca kaj angla lingvoj estis parolataj. Pro la ĉiufaj tradukoj kaj konsekvencaj miskomprenoj la kongreso estis tre longedaŭra kaj por la partoprenantoj enuiga. Tial frapis min multe kiam dum 10 tagoj mi persone povis konstati, kiel homoj venintaj el 10 landoj, en kunvenoj kaj surstrate tiom facile kaj flue interkomprenis per Esperanto. Mi estis ankoraŭ pli surprizita ĉar el la societo ĉiuj, krom kelkaj, nur lernis sian gepatran kaj Esperantan lingvojn kaj multaj el ili vizitadis la elementan lernejon. Mi konstatis la belsonecon kaj facilecon de Esperanto. Mi mem voĉlegis salutparolon en Esperanto kaj ĉiuj Esperantistoj, kvankam mi neniam antaŭe parolis Esperanton, povis plene kompreni min. Persone mi spertis, ke tio tute ne estas ebla per angla, franca aŭ alia lingvo.”

Al la demando pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, li respondis:

“La koncerna ministro jam iom aludis pri tio. Kiel ano de la parlamento mi certe instigos lin

fari konkretajn agojn... Esperanto meritas ĉies atenton. Per tiu facila lingvo la homoj povas facile interkorespondadi kaj poste reciproke viziti unu la alian kaj tial per la Esperantomovado oni multe kontribuos al la tiom arde dezirata internacia paco.”



La bildo montras D-ron J. in t' Veld salutantan en Zaandam.

M.S.

EGIPTUJO

En Ĝenerala Kunsido la Egipta Esperanto-Asocio elektis novan estraron por 1948. Prezidanto estas S-ro Amin el Mofti kaj S-ro Said Saleh estas Sekretario. En la komitato troviĝas D-ro Tadros Megalli, Peranto de U.E.A.

Internacia Ekspozicio de Infanaj Desegnoj


La ekspozicio organizita de la Esperanto-Societo de Lyon okazos de la 22-a de Majo ĝis la 13-a de Junio en la festsalonoj de la Urbdomo de Lyon. Ĝi estos solene inaŭgurita de la urbaj aŭtoritatoj. La desegnoj venis de dek kvin landoj. Ili ĝenerale prezentas tipajn scenojn de ĉiu lando. La Societo estus tre feliĉa ricevi ankoraŭ desegnojn. Formato alproksimiĝu al 21 × 27 cm.

Okaze de tiu ekspozicio granda propagando estos farata en Lyon per afiŝoj, invitkartoj, artikoloj en la gazetoj, alvokoj en la radio k.s. La instruistoj estos speciale invitataj venigi siajn lernantojn.

Post la fino de la ekspozicio la tuta materialo povos esti metata je la dispono de aliaj grupoj kaj societoj. Sendu desegnojn al Richard Levin, 55 Avenue Félix Faure, LYON, Francujo.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Legolibro** por superaj kursoj kaj memklerigo. Verkis Ivan Sarafov; eld. Bulgara Esperantista Kooperativo. 20.8×14.5 cm. 232 p. broŝ.

Prezo 7ŝ., afranko 6p.

En la pasinteco tro ofte okazis, ke legolibroj destinitaj por kursa legado pli emfazis la forman, la stilan kaj la gramatikan flankojn sed prezentis enhavon iom sekan, eĉ neinteresan. Agrable impresas la objektiva prezento de materialo, kiu estas samtempe instrua kaj interesa. Legante ĉi tiujn tekstojn, la studanto nekonscie asimilos multajn informojn, kiujn havigi necesus tralegi grandan kvanton da libroj. La informoj estas ĉerpitaj el multaj fontoj kaj nedetale skizas diversajn fazojn de la evoluo de la Esperanto-movado. Estas espereble, ke tio vekos la scivolemon de la leganto kaj igos lin turni sin al tiuj fontoj por kompletigi la bildon pri la elvolviĝo de la movado.

Salutindaj estas la *Kongresaj Paroladoj* kaj la *Letero pri la deveno de Esperanto* de D-ro Zamenhof, kaj la konsilo de D-ro A. Stamatidis (kiun tamen jam siatempe donis Prof. Cart) sub la titolo *Verku Klare!* devus troviĝi en grandaj oraj literoj en ĉiu grupejo, ĉiu studĉambro, kaj ĉiu renkontejo de Esperantistoj tra la mondo.

Aparte interesaj estas la notoj pri la elvolviĝo de la Laborista Esperanto-movado, kaj eksterlandanoj legos kun intereso kaj ĝuo la ĉerpaĵojn el la Bulgara literaturo.

Eraroj ne mankas, sed ili ne abundas, kaj ne valoras la penon ĉi tie citi ilin. Nur pri malĝuste uzitaj radikoj mi atentigas: La plurfoja uzado de *kadenco* devus esti *dekadenco*; *akcio* (p. 48) kiu jam havas definitivon sencon *porcio de partopreno en komerca entrepreno*, devus esti *kampanjo*, kaj *konsekvencojn* sampaĝe devus esti *sekvojn*.

Verko leginda kaj rekomendinda.

M.S.

Transhimalajo: tekstaro de filmstrio eldonita de la Esperanto-Filmgrupo en Bergen op Zoom, Nederlando. Ĉi tiu numero daŭrigas la serion de interesaj vojaĝbildo. La tekstoj estas iom pezaj pro envolvita stilo, kaj ne mankas eraroj de gramatika speco. Oni supozeble opinias, ke stilo ne multe gravas ĉe tia afero, sed oni povus multe plibeligi la tekstojn per atento al estetikaj konsideroj, kiuj farus la serion ne nur enhave instrua, sed ankaŭ lingve. La tre originala entrepreno meritas subtenon.

***Printempo de Morto**: Romano, el hungara originalo de Lajos Zilahy; trad. Ladislao Somlai (Spierer). Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 20×13 cm. 121 p. Prezo 9ŝ. 6p., afranko 6p.

Ĉi tiu hungara romano, kvankam ne *arto pro arto*, estas beletristiko. Ĝia beleco troviĝas en la ekscita fluo de la intrigoj kaj la majstra malmultvorta priskribo de la scenoj. Ĝi juste ricevis literaturan premion en 1936.

La verkinto intencis per ekzemplo de senmorala aristokratido bildigi la dekadencan de la hungara burĝa klaso post la unua mondmilito. Li ne tute sukcesis. La dekadenco estas tie, sed kredeble la heroo ne estus pli morala aŭ malpli egoista homo, se li estus malriĉulo. Lia karaktero ŝajnas pli hereda ol media.

Oni komence malestimas lin, sed poste iom kompatas. Liaj impulsoj estras lin la tutan vivon. Celante fariĝi ministro, li decidas edziĝi al filino de generalo, sed ekamas ŝin. Kredante ŝin malfidela, li forlasas ŝin, igas alian virinon enamiĝi al li, forludas sian tutan monon sopirante la unuan amatinon, promesas edzinigi la duan kaj, konstatinte, ke la unua efektive amas nur lin, mortigas sin.

La tradukinto honoris sian taskon. La frazoj, plej ofte mallongaj, estas preskaŭ ĉiam tuj kompreneblaj. Nur unu frazon mi ne komprenis: *subita, eta saleco transkuris min* p. 92. Eble temas pri preseraro, da kiuj parenteze estas malpli ol dudek en la libro. Iom strangaj esprimoj estas *longkrura pipo* p. 9, *mortige mortiga veneno* p. 18, *cowboy-marŝo* p. 41, 47. Ne tre klara estas *ĉambro, kiu estis aranĝita fumejo* p. 38. Aldoni kiel aŭ esti post *aranĝita plibonigus la frazon*.

Evitindaj misuzoj de vortoj estas *binoklo* (okulvitro) 8, 10, 32; *alimentado* (pensiono) 10; *rokoko* (rokoka) 16; *fantastikaj* (fantaziaj) 17; *opiumo* (opio) 30; *parolo . . . surda* (parolo . . . obtuza) 36; *pensionita ministro* (pensiita ministro) 92; *tero* de ĉambro (planko) 102, 116.

Al tiuj, kiuj konas la eldonejon, ne necesas diri, ke la libro estas bele presita kaj bindita. La bildo sur la kovrilo bonege ilustras unu el la plej plaĉaj scenoj en ĉi tiu erotike romantika libro.

E. P. Ockey.

Maçao da Soc. Catarinense de Estatística ao XI Congresso Brasileiro de Esperanto em São Paulo, 1947. Raporto de la Societo S-ta Katarino de Statistiko kun resumoj en Esperanto. Tre imitinda kaj gratulinda produktaĵo. Enhavas interesan artikolon pri *Esperanto en statistiko*. Oficiala eldonaĵo. Prezo ne montrita.

Kdo Je L. L. Zamenhof : Napsala Julia Šupichová (Kiu estas L. L. Zamenhof ; kompilis Julia Šupichová) Ĉeĥlingve. Eld. Orbis, Praha, 1948. 12.5×18 cm. 36 p. Prezo 6 kč.

Ĉi tiu tre populara serio *Kdo je* (Kiu estas) disvastigas scion pri eminentaj homoj el ĉiuj sferoj de homa agado. La 89-a numero traktas pri nia Majstro kaj ni devas gratuli la senlacan batalantinon F-inon Šupichová, ke ŝi sukcesis enirigi la biografion en ĉi tiun serion. Teksto agrabla kaj facila, sen lerneja karaktero. La kovrilon ornamas desegnaĵo, bildo de D-ro Zamenhof, farita de Adolf Bartošík. Utila informo pri la Esperanto-movado finas la tuton. Bonega propagandilo, kiu certe ne nur konigas la vivon de granda idealisto sed havigos novajn adeptojn al lia verko. Pura preso, agrabla literaro.

Jiří Sedláček.

Galileo Galilei 1564–1642 : de Bento de Jesus Caraca. Scienca kaj morala valoroj de lia verko. El portugala lingvo tradukis Manuel de Freitas. Eld. Portugala Eldona Rondo, Porto. 19.5×13 cm., 62 p. kun kovril-bildo kaj grafikaĵo. Prezo nemontrita.

Estas vera ĝuo legi ĉi tiun libreton, kiu ne estas nura biografio pri Galilei, sed vivanta priskribo de la batalo por ideo. La teksto estas parolado farita en la popol-Universitato Lisbono. La eniron formas la akuza dokumento de la inkvizicio kaj estas sekvata de la malkonfeso de Galilei. Oni legas tion kun emocio, sciante kion atendis aliaj pensuloj en ĉi tiu epoko en simila situacio. Sed estis la jaro 1633, furiozegis terura milito kaj sentiĝis jam nova vento. Aldonita al ĉi tiu teksto estas grafiko, kiu montras la fluon de la ideoj pri nia mondo tra la epokoj. La konkludo de la parolanto estas jena :

“Ankaŭ nuntempe okazas kruela batalo por la valorigo de la homo, kaj la reala malamiko estas ankoraŭ la sama—la trouza influo de la individuo, sur la socion. Kun la diferenco, ke tiu batalado nun okazas ne nur sur la astronomia tereno, sed sur la socia.”

Ni gratulas la tradukinton pro la vere bona traduko, la klara lingvo kaj la evito de novaj vortoj kaj formoj. Iom ĝena estas kelkfoje la disigo de la vortoj (kvankam D-ro Zamenhof tion ja inaŭguris !). Tre bona preso sur bela papero inde kompletigas la enhavon de la libro.

H.J.

***Glumarkoj de U.E.A.** denove haveblaj. Argentaj kun verda surskribo. Prezo 100 por 9 p. aŭ 3 rpk. afrankitaj. Utila propagandilo en la korespondado.

***Sub la Verda Standardo : Laborilo II** : 60 paĝoj. Prezo 2ŝ., afr. 2p.

Ĉi tiu kajero estas daŭrigo de la rektmetoda kurso samnoma. Ĉio, kion mi jam skribis pri la unua parto (ESPERANTO 508) validas ankaŭ pri la jena, ĉar la metodo fundamente ne aliĝis.

Kvankam la takto de la kurso iom post iom plirapidiĝas, ĝi tamen ne preteriras la kapablojn de normalaj infanoj, kondiĉe ke la instruisto mem senĉese atentu la firman konsilon de la verkinto, *Ne tro rapidu* !

Kelkaj el la aldonaj trajtoj, kiuj bone enkondukiĝis, estas :

1. bona epizoda fabelo en sinsekvaj lecionoj
2. la grava paŝo al originala verkado de la infanoj ĉirkaŭ kerno de donita materialo.
3. Bildoj kaj tekstoj enhavantaj erarojn, kiujn la infanoj eltrovu.

Malplej rekomendindaj estas kelkaj tekstoj, kiuj entenas intence enmetitajn gramatikajn erarojn. Ne ĉiu instruisto konsentas pri la psikologia praveco de tiaj ekzercoj, kvankam ili eble evoluigas kritikeman kapablon ĉe la infanoj.

Malgraŭ kelkaj makuletoj, i.a. *trifoje* anst. *trioble* (p. 43) kaj la ellaso de la akuzativo de direkto post *meti* (multloke), la dua kajero nepre kontentigos tiujn, kiuj posedas la unuan.

G.M.

Imitinda Ekzemplo

Almelo en Nederlando kaj Köge en Danujo estas amik-urboj. La nederlandaj Esperantistoj, L.E.E.N., oficiale invitis delegitaron de Köge-a Urbestro al kongreso, okazonta dum Pasko en Almelo. La urba estraro de Köge decidis delegi S-on P. Lendorff kiel sian reprezentanton.

Junular-brigadoj

Dum pasinta jaro venis al Bulgarujo brigadoj por publika utila laboro. Tiuj konsistis el junuloj el ĉiuj landoj. Malgraŭ la granda sukceso de ĉi tiuj brigadoj, la anoj mem ne sentis sin hejmece pro la manko de senpera interkomprenilo. La Bulgara Esperanto-Asocio proponis al la enlanda organizaĵo de ĉi tiu servo la uzadon de Esperanto. Junaj Esperantistoj, kiuj deziras partopreni ĉi tiun agadon, skribu al S-ro Jivko Jivkov, prezidanto de S.N.M., Mladeŝki Dom, ul. Al. Stamboljiski 11, SOFIA, Bulgarujo, kaj petu informon pri la Brigadista Movado kaj deklaru, ke se S.N.M. organizos Esperanto-tendaron ili partoprenos. **Ne menci**u, ke vi sekvas inviton de la Bulgara Esperanto-Asocio.

33-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Malmö, 1948



Tria Listo de Kongresanoj

619. F-ino J. Carre, Villefranche, Francujo
620. S-ro J. Chapellier, Nancy, Francujo
621. S-ino G. M. Chapellier, (edzino)
622. S-ro A. Labit, Tourcoing, Francujo
623. S-ro P. Hubert, Paris, Francujo
624. S-ro R. Llech-Walter, Perpignan, Francujo
625. S-ino Llech-Walter, (edzino)
626. F-ino Llech-Walter, (filino)
627. S-ro E. Laugier, Fontenay-sous-Bois, Francujo
628. F-ino G. Dumoulin, Tassin, Francujo
629. F-ino Coydon, Paris, Francujo
630. F-ino B. Clavier, Caluire, Francujo
631. S-ro P. J. A. Muffang, Bourg-La-Reine, Francujo
632. F-ino A. Muffang, Caen, Francujo
633. F-ino J. M. Saurin, Nice, Francujo
634. F-ino M. Fossat, Nice, Francujo
635. F-ino M. Martz, Savigny-sur-Orge, Francujo
636. S-ino M. T. Moreau, Paris, Francujo
637. F-ino M. Pinel, Colombes, Francujo
638. S-ro A. Mitty, Paris, Francujo
639. S-ino M. J. Marandelle, Paris, Francujo
640. F-ino G. Lemonnier, Paris, Francujo
641. F-ino G. M. Gaillot, Paris, Francujo
642. S-ro B. Gonon, Thiers, Francujo
643. S-ino G. Gonon, (edzino)
644. S-ro E. Deluc, Thiers, Francujo
645. S-ro C. Bost, Thiers, Francujo
646. S-ino G. Bost, (edzino)
647. S-ro P. Bost, (filo)
648. S-ro J. Lavest, Thiers, Francujo
649. S-ino Boyat, St. Nizier-la-Bouchoux, Francujo
650. S-ro H. Dabezies, Paris, Francujo
651. S-ino S. Dabezies, (edzino)
652. S-ino L. Fanger, Vincennes, Francujo
653. S-ro L. Raulo, Somero, Finnlando
654. S-ino L. Hongisto, Somero, Finnlando
655. S-ro L. Braet, Nieuwpoort, Belgujo
656. S-ino L. Braet-Vermeire, (edzino)
657. S-ro M. Braet, Nieuwpoort, Belgujo
658. F-ino A. Dobbelaere, Nieuwpoort, Belgujo
659. S-ro K. Pedersen, Holbaek, Danujo
660. S-ro J. Skorpil, Tábor, Ĉeĥoslovakujo
661. F-ino A. Hakansson, Stureby, Svedujo
662. F-ino N. Thörnberg, Stockholm, Svedujo
663. S-ro J. W. Sedendahl, Uppsala, Svedujo
664. F-ino E. Zandrén, Valskog, Svedujo
665. S-ro C. Ekström, Eksjö, Svedujo
666. S-ino Ekström, (edzino)
667. S-ro G. S. Andersson, Skövde, Svedujo
668. S-ro G. Borgner, Bäckseda, Svedujo
669. S-ro T. Svensson, Hägersten, Svedujo
670. S-ro E. Eriksson, Uppsala, Svedujo
671. S-ro L. Chalon, Ulvsunda, Svedujo
672. S-ino A. Adler, Malmö, Svedujo

673. S-ro I. Wetterström, Vamlingbo, Svedujo
674. S-ro A. Lundkvist, Malmö, Svedujo
675. S-ro M. Fejde, Nässjö, Svedujo
676. S-ino M. Fejde, (edzino)
677. F-ino G. Fejde, Nässjö, Svedujo
678. S-ino M. Andersson, Kungsgården, Svedujo
679. S-ino N. Asplund, Eskilstuna, Svedujo
680. S-ro J. Jacobsson, Nordmaling, Svedujo
681. S-ino H. Wanhainen, Vittangi, Svedujo
682. S-ino B. Christiansson, Vittangi, Svedujo
683. S-ro A. C. Rönner, Stockholm, Svedujo
684. S-ro T. Morariu, Stockholm, Svedujo
685. F-ino D. Morariu, (filino)
686. S-ro G. Hansson, Änäset, Svedujo
687. S-ro K. Rhodin, Eskilstuna, Svedujo
